

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 6/2004
Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Decembro 2004

Literatura Numero

Esperanto estas poemo
skribita
kiel lingvo.

— Keneĉjo Goldbergo

Esperanto and Literature

by *Don Harlow*

(*This short essay is aimed at those who have not yet dived into the joys of Esperanto, and so is in English.*)

A: I've been studying Esperanto for three weeks now.

B: You have? May I see your poetry?

Old joke among Esperanto speakers

It has never been clear to me why so many speakers of Esperanto – even those who have just been introduced to it – are so enthusiastic about *creating literature* in the language. I've never seen that phenomenon associated with the other foreign languages I've studied. I took three years of Latin in high school, and I think I was the only person in my class who ever wrote anything – except translation exercises – in Latin, and I only did that once, for a lark. I saw the same phenomenon in my high school French course and in my university Russian and German courses (in these last three, I, too, studiously avoided trying to actually *write* anything in the language in question).

Naturally, most of us can point to foreign authors who have written in English. Joseph Conrad, Vladimir Nabokov and Salman Rushdie spring immediately to mind. Chinese author Yeh Junjian's English-language *Mountain Village* was an British book-club selection some sixty years ago. But most of these people were ultimately immigrants to the English-speaking world, and generally abandoned their own language in favor of English out of simple need (one anecdote has it that Rushdie, who immigrated to Britain when he was 13, could not get along in his native Urdu when he returned on a visit to Pakistan many years later). Yeh, mentioned above, may be an exception, but when he wrote his book in English he had already had some experience with writing in a foreign language (his first work, a collection of short stories, *Forgotten People*, was written by him in Esperanto).

But Esperanto is remarkable in that it has so many people who write in it without ever leaving their homelands or their native tongues.

Why write in Esperanto? There are a number of explanations. Baldur Ragnarsson, for instance, is rumored to have written most of his works in Esperanto simply because he felt that he could reach a wider audience than if he wrote in his native Icelandic. Marjorie Boulton, whose English-language textbooks on literature have been used in universities in a number of Commonwealth countries, didn't have that excuse; but apparently she simply fell in love with Esperanto (more particularly: with the Esperanto poetry of Kalman Kalocsay), and for sixty years has been writing her poetry exclusively in Esperanto.

This latter reason, I think, is the one most applicable to those who, a week or so into their study of Esperanto, start writing original works in Esperanto. But what about those who translate? My own feeling is that they have suddenly been given access to a wider world out there, and they want to *share* what they have with the rest of the world.

Do you want to write something in Esperanto, or translate something into Esperanto? Get it published in an Esperanto magazine, or posted on the internet? Don't be afraid to try. You can do this, you know.

And now, read on ...

Esperanto League for North
America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
☎510/653-0998; 📠510/653-1468
✉elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Alexander Shlafer
Vice President/Vicprezidanto: Phil Dorcas
Secretary/Sekretario: Anna Bennett
Treasurer/Kasisto: William B Harris
Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Thomas Alexander, Joel Amis, D Gary
Grady, Anjo Harlow, Lusi Harmon, Jerry
Johnson, Orlando E Raola, Jacob
Schwartz, Tim Westover

*Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo:* Joel Brozovsky

esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the
Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 40, No. 6
ISSN 1056-0297

Editor/Redaktoro: Don Harlow
☎510/222-0187; 📠510/653-1468
✉ donh@donh.best.vwh.net

Materials for esperanto usa should be
sent to/Materialojn por esperanto usa
oni sendu al:

esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO
or by e-mail/aŭ retroŝte al:
e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin
are those of the authors, and don't
necessarily represent the point of view
of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-
itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj,
kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de
ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted materi-
al is sent to ELNA/Estas permesate
reaperigi materialojn el ĉi bulteno,
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj
ke oni sendu ekzempleron de la repu-
blikigita materialo al ELNA.

Deadline for issue 2005/2 Limdato por
numero 2005/2: 2005.05.01

de *ABELO gis *ZUMI

Abelo.

Ili nomas min abelo.

Kiu?

Leksikografoj.

(Abelo: diversaj specoj)

Abelo: insektoj kiuj produktas mielon kaj vakson; abelo zumas.

Abelo, ili nomas min.

Ili metas vorton je ciu ajo kaj ordigas la vortojn ekde a-o gis z-o.

Kaj la leksikografo supozas ke li bone faris sian taskon.

Ke li kaj liaj legantoj scias kio estas abelo.

Eble ili scias pri vortoj. Eble ili ec scias kelkajn faktojn pri abeloj.

Sed, kiom ili komprenas pri abeloj? Neniom.

Kion la leksikografoj komprenas pri la gojo de la komunumo kiu agas unuece, de la senpensema lojaleco, de la sindonema obeo al devo?

Kion ili scias pri la eterna zumado?

Niaj kuragaj herooj, kiuj respondis al la voko de devo, kiuj faris la grandan oferon, kiuj vivas eterne en la lando de eterna zumado.

Kion ili komprenas pri la granda teruro? Pri la timego de la abelaro? Kion ili scias pri la terura amas-paraliziga armilo de la atakistoj. Kion ili scias pri la malica detruado de la plekto de niaj vivoj? Detruado farita de la malicaj, senkoraj, senkompataj atakistoj kiuj formangas la frukton de niaj laboroj.

Ni nomas ilin atakistoj.

Kiu? Ni.

Ni nomas ilin atakistoj.

Kaj ni supozas ke ni scias kio estas atakisto. . . .

Ne... Ne. Ne. Pri tio mi ne pensos.

Mi ne volas igi leksikografo.

Leksikografoj ne placas al mi.

Tute ne.

Se mi renkontus leksikografon, . . .

versajne mi pikos lin,

kaj mi estus preta eterne zumi.

bob russell

La dua inaŭgura prelego de Abraham Lincoln

la 4an de marto, 1865

elangligis Donald Jacob UITVLUGT

Samlandanoj: ĉe tiu ĉi dua aperado por ĵuri la ĵuron de la prezidenta ofico, malpli estas okazo por etendita prelego ol estis ĉe la unua. Tiam deklaro, iom detale, de kurso sekvenda, ŝajnis taŭga kaj ĝusta. Nun, ĉe la fino de kvar jaroj, dum kiuj publikaj deklaroj konstante envokiĝis pri ĉiu punkto kaj fazo de la granda lukto kiu ankoraŭ absorbas la atenton kaj tutokupas la fortojn de la nacio, malmulto kiu estas nova povus prezentiĝi. La progreso de niaj armiloj, de kiu ĉio alia ĉefe dependas, estas konata kiel al la publiko tiel al mi mem; kaj ĝi estas, mi fidas, sufiĉe kontentiga kaj kuraĝiga al ĉiu. Kun alta espero por la estonteco, neniun prognozo rilate al ĝi estas proponata.

Ĉe la okazo respondanta al ĉi tiu antaŭ kvar jaroj, ĉiuj pensoj estis maltrankvile celataj al minacanta enlanda milito. Ĉiu timegis ĝin – ĉiu penis eviti ĝin. Dum la inaŭgura prelego estis eldirita el ĉi tiu loko, tute dediĉita savi la Unuiĝon sen milito, ribelaj agentoj estis en la urbo serĉantaj detruigi ĝin sen milito – serĉantaj dissolvi la Unuiĝon, kaj dividi havaĵojn, per negocado. Ambaŭ partioj malaprobis militon; tamen unu el ili prefere militus ol lasi, ke la nacio pluvivas; kaj la alia prefere akceptus militon ol lasi, ke ĝi pereas. Kaj venis la milito.

Unu okono de la tuta loĝantaro estis koloraj sklavo, ne ĝenerale distribuitaj tra la Unuiĝo, sed lokigitaj en la Suda parto de ĝi. Tiuj ĉi sklavo konsistigis apartan kaj fortan koncernon. Ĉiu sciis, ke ĉi tiu koncerno estas, iel, la kaŭzo de la milito. Por fortigi, daŭrigi, kaj etendi ĉi tiun koncernon estis la afero por kiu la ribeloj ŝirus la Unuiĝon, eĉ per milito; dum la registaro pretendis neniun rajton fari pli ol limigi la teritorian pligrandigon de ĝin.

Neniu partio antaŭvidis por la milito la grandecon aŭ la daŭron, kiun ĝi jam atingis. Neniu antaŭsupozis, ke la kaŭzo de la konflikto ĉesos kiam, aŭ eĉ antaŭ ol la konflikto mem ĉesos. Ĉiu atendis pli facilan triumfon, kaj rezulton malpli fundamentan kaj mirigan. Ambaŭ legas la saman Biblion, kaj ambaŭ preĝas al la sama Dio; kaj ĉiu alpreĝas lian helpon kontraŭ la alia. Eble ŝajnas strange, ke iuj homoj kuraĝas demandi la helpon de justa Dio por eldevigi ilian panon per la ŝvito de la vizaĝoj de aliaj homoj; sed ni ne juĝu, por ke ni ne estu juĝitaj. La preĝoj de ambaŭ ne povis respondiĝi – tiu de neniun respondiĝis plene.

La Ĉiopova havas siajn proprajn celojn. “Ve al la mondo pro faliloj! ĉar estas necese, ke venu faliloj, sed ve al tiu homo, per kiu la falilo venas.” [Mat 18.7] Se ni supozas, ke amerika sklaveco estas unu el tiuj faliloj, kiuj, en la providenco de Dio, necese venu, sed kiun, daŭrantan ĝis lia fiksita tempo, li nun volas forigi, kaj ke li donas al kaj Nordo kaj Sudo ĉi tiun teruran militon, kiel la veo justa al tiuj per kiuj venis la falilon, ĉu ni perceptos en tio iun ajn foriron el tiuj diaj atribuoj, kiujn la pri vivanta Dio kredantoj ĉiam kalkulas al li? Ameme ni ja esperas – fervore ni ja preĝas – ke ĉi tiu forta skurĝo de milito rapide forpasu. Tamen, se Dio volas, ke ĝi daŭru ĝis ĉiu de la riĉeco amasita de la ducent kvindek jaroj de la nekompensita laborado de la servutulo estu mallevita, kaj ĝis ĉiu guto de sango ĉerpita per la vipo estu pagita kontraŭ alia ĉerpita per la glavo, kiel oni diris antaŭ tri mil jaroj, tiel oni devas ankoraŭ diri, “La juĝoj de la Eternulo estas veraj, kaj ĉiuj estas justaj.” [Ps 19.9]

Kun malico por neniun; kun karitato por ĉiu; kun firmeco en la justo, kiel Dio donas al ni kompreni la juston, ni strebu antaŭen por fini la laboron en kiu ni estas; vindi la vundojn de la nacio; prizorgi lin kiu trasuferis la batalon, kaj lian vidvinon, kaj lian orfon – fari ĉion, kiu povos atingi kaj nutri justan kaj daŭran pacon inter ni, kaj kun ĉiuj nacioj.

[Kvardek du tagojn post kiam li diris la suprajn vortojn, Abraham Lincoln estis mortigita per kuglo de murdinto. Li estis pafita je la 14a de aprilo 1865, la vespero de Sankta Vendredo, kaj mortis en la mateno de la posta tago...]

Al Vi

De Walt Whitman

tradukis Maurice WITTENBERG

Kiu ajn vi estas, mi timas, ke vi marŝas la marŝojn de songoj,
Mi timas, ke ĉi tiuj supozitaj realaĵoj estas fandiĝontaj de sub viaj piedoj kaj manoj,
Eĉ nun viaj trajtoj, ĝojoj, parolado, domo, metio, manieroj, zorgoj, malsaĝaĵoj, kostumo,
krimoj, disipiĝas for de vi,
Viaj veraj animo kaj korpo aperas antaŭ mi,
Ili apartiĝas el aferoj, el komerco, butikoj, laboro, bienoj, vestoj, la domo, aĉetado,
vendado, manĝado, trinkado, suferado, mortado.

Kiu ajn vi estas, nun mi metas mian manon sur vin, ke vi estu mia poemo;
Mi flustras kun miaj lipoj proksime de via orelo,
Mi amis multajn virinojn kaj virojn, sed mi amas neniun pli multe, ol vin.
Ho mi estis malagema kaj muta;
Mi devus aliri rekte al vi antaŭ longe;
Mi devus babili nenion, ol vin, mi devus kanti nenion, ol vin.

Mi forlasos ĉion kaj venos kaj faros la himnojn de vi;
Neniu komprenis vin, sed mi komprenas vin;
Neniu juste traktis vin — vi ne juste traktis vin mem;
Neniu estis, kiu ne trovis vin neperfekta — mi sola trovas nenan neperfektaĵon en vi.
Neniu estis, kiu ne subordigus vin, mi sola estas li, kiu neniam konsentos subordigi vin,
Mi sola estas li, kiu metas super vin nenan mastron, posedanton, plibonulon, dion, preter
tio, kio atendas imanente en vi mem.

Pentristoj pentris siajn svarmantajn grupojn kaj la centrofiguron de ĉio,
De la kapo de la centrofiguro sternante nimbon de orkolora lumo,
Sed mi pentras miradojn da kapoj, sed pentras neniun kapon sen ĝia nimbo de orkolora
lumo,
De mia kapo de la cerbo de ĉiu viro kaj virino ĝi elfluas, brile fluanta por ĉiam.

Ho mi povus kanti tiajn majestojn kaj glorojn pri vi!
Vi ne sciis, kio vi estas—vi dormadis sur vi vian tutan vivon,
Viaj palpebroj estis ĝuste kiel fermitaj la plejparton de la tempo,
Tio, kion vi faris, jam revenas en mokadoj.
(Via ekonomio, scio, preĝoj, se ili ne revenas en mokadoj, kia estas ilia reveno?)

Sed la mokadoj ne estas vi,
Sube de ili kaj interne de ili, mi vidas vin ĉeesti;
Mi postkuras vin tien, kien neniu alia postkuris vin.
Silento, la skribotablo, la frivola mieno, la nokto, la kutima rutino, se ĉi tiuj kaŝas vin de
aliaj, aŭ de vi mem, ili ne kaŝas vin de mi;
La razita vizaĝo, la vaganta okulo, la nepura kompleksio, se ĉi tiuj heziligas aliajn, ili ne
heziligas min;
La aŭdacajn vestaĵojn, la misformitan pozon, drinkemon, avarecon, la antaŭtempan
morton, ĉiujn ĉi mi flankenseparas.

Ne estas dotaĵo en viro aŭ virino, kiu ne estas inkludita en vi;
Estas nenia virto, nenia belo, en viro aŭ virino, pri kiu ne estas egale bona en vi;
Nenia kuraĝo aŭ eltenivo en aliaj, pri kiu ne estas egale bona en vi;
Nenia plezuro, atendanta aliajn, pri kiu egala plezuro ne atendas vin.

Kiel koncernas min, mi donas nenion al iu sen tio, ke mi zorge donas simile al vi,
Mi kantas la kantojn de la gloro de neniun, eĈ ne Dio, pli volonte, ol mi kantas la kantojn
de la gloro de vi.

Kiu ajn vi estas! pretendu vian propran je kia ajn danĝero!
Ĉi tiuj montraĵoj de la oriento kaj okcidento estas mildaj kompare kun vi;
Ĉi tiuj grandegaj kampoj — ĉi tiuj senfinaj riveroj — vi estas tiel grandega kaj senfina kiel
ili.
Ĉi tiuj furiozoj, elementoj, ŝtormoj, moviĝoj de Naturo, agonio de ŝajna dissolviĝo, vi
estas li aŭ ŝi, kiu estas mastro aŭ mastrino super ili,
Mastro aŭ mastrino proprarajte super Naturo, elementoj, doloro, pasio, dissolviĝo.
La piedkatenoj falas de viaj maleoloj—vi trovas nemalsukcesantan sufiĉecon;
Maljuna aŭ juna, maskla aŭ femala, kruda, malalta, malakceptita de la ceteraj, kio ajn vi
estas, diskonigas sin;
Tra nasko, vivo, morto, enterigo, la rimedoj estas provizitaj, nenio estas domaĝita;
Tra koleraj, perdoj, ambicio, nescio, enuo, kio vi estas, trovadas sian vojon.

DARMA NIA

de Joe Gamble

Kia estas la vivo?
Ĉu ĝi estas nur farso, dramo,
Sencela mekanismo el protoplasmio?
Aŭ ĉu la Hindaj sanktuloj pravas –
Ĉu ja ekzistas spirita beata kohero:
Brahmanando?

Mi pensas pri la multaj sciencistoj
Kiuĵ entuziasme laboradas pri la diabla arto
De hidrogena bomba militpereo.
Ili estas frenezaj, aŭ ĉu ni
La pacaj kontraŭbatalantoj estas frenezaj?
Se ili ja estas parto de la Kohero,
Kion ili faras?

Mi pensas pri la bonaj komunistoj
Kiuĵ ŝvite laboradas por ni ĉiuĵ,
Senegoisme, obstine, ateisme
Ĉu ili ankaŭ estas parto de la Kohero?
Mi pensas pri la bonvivantaj Francoj
Kaj pri la avidaj Usonanoj
Kaj la tro-seriozaj Germanoj
Kaj pri la amikemaj Ĉinoj
Kaj Rusoj, Hindoj, Poloj.
Ĉu ili ĉiuĵ estas partoj de la Kohero?

Se la Kohero ja estas kohera
Sendube jes.
Brahmananda estas en ĉiuĵ.
Sed Brahmando ankaŭ estas preter ĉio.
La vero ne estas simpla,
Kaj la vero ne estas facile komprenebla far homoj.
Tamen, meditu kaj esperu.
Eble vojo ja ekzistas
Kaj la sanktuloj de la mondo ne mensogas.

1977

GEFEEJOJ

de Joseph Gamble

Gefeoĵ en ĉio ja plias
En arboj vibrante svingantaj
En plumoj konstante flugantaj
Pli supren – mi kien ne scias.

La semo kiu falas senpere
Enhavas misteran feinon.
Printempon venontan, de sino
Ĝi lerte elkreskos eltere.

Multaj gefeoĵ per stellumo,
Malforte videbla sen luno,
En galaksion rekte kiel sagoj
Lumigas planedojn dum tagoj.

Gefeoĵ kaj Di' estas la sam'
Esence ambaŭ estas la am'.
Prognozo de guroo Joganando –
“Ĉiuĵ estos kun Di' en fando.”

1981-1991

Iu ne rimarkinda septembra tago

De Marlon Garren

La dek unuan de septembro falis homo iale mortita,
tuta kun tiu homo nacio kaj siaj kompatantoj eruptis,
popolo kalkanume fremdan subtenon suferis vulkanizigita,
En la strato, sur la teron, en kaj per homaj manoj sangis.

La dek unuan de septembro vundigis nacio, cu ploris la homoj?
Ili pasive perforte parto igis de la komuna sangantajo de nacia viandejo.
Enlande homamaso por vivi mortis, cu la politikaj subtenantoj?
Strebante je morgaŭo pli bona, ili alilande babilis en iu drinkejo.

Tamen la prostrebantuloj sangterkovritaj solece spirite babilis en iea tombo,
iliajn vocojn neniu audante auskultas, sed akre iu kriis car la bruoj estas tro.
Sekvesekve la masino marsis ien, kie la vivo vive mortas kontraŭ dolaro.
Dolore dividita kaj justecosoifa antaŭen malamiken volis iri la homaro.

Dume la homoj, kiuj neniam auskultigis, eksilentis,
La liberecen strebantuloj sercis ilin cie, kaj trovinte ilin neniam nenie,
anoncis al la mondo, "Cio en ordo! Jam ne estas problemoj." La mondo gojis.
"La malamiko supozigis malvenkita", versajnis la registaro, neniam mensogus ci tie.

Post la terorista atako, subtenita pro eksterlandulacoj, la nacio sekve suferis ankoraŭ,
la vocoj silentis, la suferado "malaperis", la venkinta vocaco sakra mentis
malbenojn por bongustigi mensogojn.
La sankta tero rugigis, la homaro malkuragigis, estis audaco for kaj eblis nenia morgaŭo',
la subtenlanduloj kvazaŭ novajo hieraŭa jam ne oportuna taksis la tieajn mortintojn.

La gisdatan mortilan eksmodan militon celis la registaro,
tiam kase hodiaŭ male, la teron opinias ne suface rugigis
je la homarajo, sakrinda pro milionjaraj flakoj bestrestajaj,
en la hieraŭo pro politiko kaj potenco, same en la hodiaŭo.

La malgloran daton, la dek unuan de septembro de mil naucent sepdek tri,
Allende murdigis pere de verdaj biletoj, homoj murdigas pere de biletoj verdaj.
Tamen la usonanoj pensis, 'Ne gravas, restas ankoraŭ multe da tempo
por kompensi "permesitajn" kruelegajojn niajn tra la mondo.

Kiam povus okazi denove io simila al la dek unua de septembro,
kiam mortis iu ne konata homo en fora lando Cilio?'
Nu, gis kiam kaj kiom la mondo devas elteni la perforton,
eble venus preciza tago por vekti Usonon al terura realeco datrevene.

Usono volas regi la mondon perforte,
La mondo espereble iam pardonos Usonon,
Sed tio ne eblas gis la usonanaro postulus
de sia registaro pri propraj krimoj la respondecon.

21a de julio 2004

Kvin poemoj

De Doroteo Holland

Mia Kristalaĵo

Vitra, dika, steloforma
surbrete ĝi kuŝas
pale pasiva,

ĝis trafenestre
sagas la sun'
kaj jen!
sur plafono, aŭ muro
kurteno, aŭ lamp'

Tuta ĉielarko, premita en bulon,
ovale aŭ ronde briletas –
unu, du, kelkfoje eĉ tri
silente, juvele ridetas.

Se vere sciencumus mi,
eblus antaŭdiri
kie ĉiu okulos,
aŭ eĉ mem direkti radiojn.

Sed mi ĝuas la magion
se ravaj eksurprizoj –
ae mi memoras rigardi.

Kaj kiam grizas la tag'
kaj fore dormas la sun',
aliloke mi devas trovi
belecon –
se mi memoras serĉi.

Dum katastrofoj eksplodas
Kaj ĉiaj vivaĵoj suferas,
Samtempe abundas mirakloj
Kiu lumigas kaj ĝojigas:

Brilas suno kaj luno,
Kantas birdoj, muziko;
Buntas floroj, idetoj;
Homoj amas ... kaj benas.

Mirinda simetrio
de flav-ruĝeg-folio ...

Tuja akvo de krano ...
Odoro de freŝa pano ...
Kareso de kara mano ...

Multkolora ponto
inter mar' kaj monto ...

En propran liton fandiĝi ...
Dolĉan frukton frandiĝi ...

Paciga nokta kvieto ...
Ridado kun amiketo ...

Avidas mi tiajn miraklojn,
momentojn
Por kompensi malbelon,
turmentojn ...

Simplecon mi sopiras

**

Jen rozo rava
sed sube insektoj voremaj, kaj
dornoj.

Jen bonkoraj homoj pac-celaj
sed inter ili malharmonio.

Jen birdo bluega, vigle saltante;
sed celas ĝin kato ĉasema.

**

Simplecon mi sopiras,
sciante tamen
ke ĉe homoj, ĉe bestoj
ĝi ne ekzistas.

**

Jen solvo provinda:
Mense izoli la plej plaĉajn erojn,
kaj ilin frandadi
kiel eble plej ofte.

Mirakloj

*Floro iĝas pomo,
El du etetoj ... homo.*

*Kverko venas el glano;
El fiŝeto ... rano.*

*El nokta nigro, bluo;
El du amoj ... unuo.*

OPUSO NUMERO UNU

de Joseph Gamble

arboj belas nur
kiam la suno ilin lumigas.

vortoj belas nur
kiam homo ilin komprenas.

okuloj belas nur
kiam animo ilin vivigas.

kiam mi vidas min en viaj okuloj
nur tiam mi mem belas.

1980

“Karaj Tri Reĝoj” {*}

de Esteban Casañas Lostal

Elhispanigis David Pardue

Ie en la mondo . . .
La 13-an de decembro, 1999

Karaj Melkioro, Gasparo kaj Baltazaro,

Saluton, amikoj. Mi ĉiam skribis al vi por esprimi miajn proprajn dezirojn kaj kutime vi ĉiuj kompleksis min. Tamen laŭ miaj rimarkoj {%}, vi ne estis tre justaj je la disdonado de ludiloj. Eble vi ne povas transporti ilin per viaj kameloj sed verdire ili ne sufiĉas por ĉiuj infanoj.

Finiĝas ĉi tiu jarcento same la jarmilo, kaj dum multaj jaroj mi konatiĝis kun multaj geamikoj, kelkaj volus skribi al vi tamen bedaŭrinde ili ne scipovas tion fari. Jen kial mi skribas al vi nome de tiuj.

Joĉjo deziras ganton por ludi basbalon sed li opinias pli necesa havi laborgantojn; la kompatindulo pasigas sian infanaĝon helpante al sia familio malriĉa.

Kvankam Nataŝa dezirus pupon tamen ŝi diras, ke ŝi bezonas liteton por sia fratineto.

Igor ĉiam deziris havi biciklon tamen babilinte kun mi, li esprimis sian opinion, ke multe pli gravas proteza kruro ĉar li perdis la kruron ekpaŝinte sur minon, kiun oni plantis depost kiam estiĝis milito kruela en lia lando.

Manĉjo revas pri fajrokamioneto, li havas naŭ jarojn kaj laboras kiel fajroglutisto ĉe la trafiklumoj de Meksikurbo.

Kiam ŝi havas libertempon, Lucia ŝatas roli kiel dommastrino sed tiuj momentoj daŭre malpli oftas ĉar ŝi laboras kiel ĉiesulino por helpi al sia patrino same gefratetoj. Ŝia patro forlasis ilin antaŭ kvar jaroj.

Mohamedo amas kajtoflugadon. Kajtoj estas tre malmultekostaj sed nun ne eblas, ke li flugigu kajton ĉar li perdis la manojn pro bombo, nun ankaŭ li bezonas protezon.

Miaj aliaj geamikoj nur petas min, ke mi parolu al vi pri nutraĵo — kvazaŭ ĝi estus io simila al ludilo. Iuj ploras petante al mi, ke mi redonu al ili la gepatrojn malaperintajn. Iuj malaperis transirinte landlimojn, aliaj estis englutitaj de la maro, kelkaj ne revenis de la multaj militoj . . . temas pri katastrofo homa, jen kial mi skribas al vi.

Tamen nenio, kio nin ĉirkaŭas ŝanĝiĝis, niaj cirkonstancoj preskaŭ ĉiam malboniĝas. Kvazaŭ neniu memorus, ke ni estas infanoj, ke ni estas la estonteco de ĉi tiu tero, kiun bedaŭrinde ili iompostiome detruas. Ili ne ĉesigas la militojn, ili ne paŭzas dum unu sekundo por konsideri, ke per la monsumego, kiun ili elspezas, eblas konstrui multajn lernejojn, malsanulejojn kaj eĉ loĝejojn pli bonajn. Ni troviĝas en mondo saturita de malmamoj, soifo al venĝo kaj tio estas la nura heredaĵo, kiun ili postlasas al ni. Tagon post tago nia situacio iĝas pli netolerebla, meze de la malakordoj inter homoj de malsamaj ideologioj, dum iliaj ŝtatestroj amuzas sin je nia kosto kaj preskaŭ neniam plenumas siajn promesojn.

Mi ne petas ludilojn por miaj geamikoj; pli ĝuste mi volus, ke vi serĉu alian planedon por ni, tamen ĝi estu loĝata nur de infanoj. Ĝi estu loko, kie la tempo haltas kaj ni ne povas kreski, por ke ne kresku inter ni la malamo de la plenkreskuloj, kie ni iam pace ludu kaj memoru, ke ni estas nur infanoj. Mi volus, ke ni loĝu en loko, kie ne aŭdeblas bombeksplodoj, kie oni povas ekdormi sen timo, kie malaperas larmoj kaj plorado, kie regas nur la feliĉo — tia feliĉo, kian oni sentas kiam ne ekzistas landlimoj kreitaj de la homoj, kie ne gravas la haŭtkoloro, kie estas nur unu Dio por ĉiuj. Tamen tiu planedo estu nia, kaj estu sufiĉa spaco nek por malsato nek por mizero. Tiu planedo estu loĝata de infanoj posedantaj siajn brakojn kaj siajn krurojn, posedantaj ridetojn larĝajn, same ke tiuj ridetoj neniam malaperu.

Mi petas, kiam vi malkovros tiun mondon novan por ni, bonvolu konduki nin tien kun vi tamen neniam — bone atentu — neniam diru al la plenkreskuloj, kie ni loĝas.

Multe amas vin, Albeĉjo

Casañas Lostal, Esteban (Havano, Kubo, 1949-) Komerca maristo ekde la aĝo de 17 jaroj. Profesoro de navigacio ĉe la Akademio Militŝipa de Mariel. Li militservis en Angolo 1,5 jarojn kaj forfuĝis al Kanado en 1991. Aŭtoro de la antologio *Cuba es un cuento, compay!* (Pittsburgh : RoseDog Books, 2003. xi, 321 p. ISBN 0-8059-9202-2). {&}

Komentoj / Klarigoj:

{*} . Reĝoj vs. Saĝuloj: Mi ne scias, kiu vorto plej konvenas ĉi tie . . . En la evangelio laŭ S-ta Mateo oni nomas ilin “saĝuloj” (2:1, 2:7) tamen en *PVE* oni nomas ilin “reĝoj” (s.v. “Epifanio”).

{%} . Ĉu estas ĝusta la ebla varianto: “tiom kiom mi rimarkis”? (Ĝi ŝajnas iom stranga al mi).

{\\$} . Tiu ĉi verkitaĵo ne estas en la antologio *Cuba es un cuento* sed aperis nur en la reto (la verkinto afiŝis ĝin en pluraj novaĵgrupoj).

Honore al Hispanio

De Marlon Garren

En la mondon venas nova voĉo,
timiganta la registarojn tra la mondo
per popoloj de pacama raso,
ĝi apartenas al la homar’.
La aroganta busa reĝimo ne aŭskultis siajn gentojn
kaj celis je iu fiaĉa koalicio de la “volemaj”.
La busanoj amikojn trovis en la mondo,
kvankam ties amasoj kriegis,
‘Al la milito diru, NE!’
Tiuj amikoj de la buso en aznara lando
kontraŭis sian enloĝantaron.
Finfine stariĝis busa volemulo
kaj li ekis al la imperialismo.
Post sangsoifantaj monatoj
en cida tero venis la moment’.
La tieaj homoj jam volis ekaligi aznaranojn,
homaro surstratamase voĉdonis ilin for,
Kaj baptita en homa ruĝeco sankta
novan registaron starigis la hispanoj.
Aznaranoj ne estis esperanta
je io pli bona,
busanoj for atenton volus nian turni.
Donacis al la mondo esperon Hispani’
je pli bona morgaŭ’,
kaj la koalicio el ĝia lando estu for.
Kie estas la aznaranoj?
Espereble neniam revenos.
Ĉu trovis la promesitajn amasdetruarmilojn Buŝ’?
Ĉu gravas dum regas la hipokrit’?
Nu, se vi fidus je ne esperantuloj,
vi baldaŭ en propra lando fremdulos.

13an de julio 2004

Kiamaniere Morti

de Joseph Gamble

Homoj teraj mortas diversmaniere,
Senescepte, ja sukcese tusincere.
Kial ni prizorgu tion? Ĉu egale
Nulaj ĉiuj estas tuj post la morto?
Tre malmultaj vidis kion Fino portas,
Sed ni tre malsamaspektas *dum* ni mortas.

Materialisto, ĉu kredante aŭ ne
Religion, timas morton, tragic-klaŭne
Strebas ĉiam por la vivo ĝis la fino.
“Estas mi nur korpo,” sentas li nevole.
Pro teruro kredas nur pri idealo,
Timo baras lian vidon pri realo.

Aliflanke sinmortiga homo amas
Morton iomete eĉ pli ol ekflamas
Viv’ en lia sino. Eble tio timas
Ambaŭ spertojn. Krei pli da finkonflikto
Ne kapablas ia menso. Eble ruzo
Eĉ heroa, sed ja ege en konfuzo.

Homo kiu mortas plaĉe eksubite
Pro ekakcidento tre senekscitite,
Aŭ eĉ kiam dum batalo furioza
Ne havante tempon tiam por medito,
Lin maltrafas sperto eble tre valora –
Nur ĉe fin’ evitas mortotim’ angora.

Tiu kiu plene scias la aferon
Estas rara hom’, komprenas la suferon.
Mortos li laŭ Dia sed per propra volo.
Li ne sin mortigas, nur sin elkompigas.
Jen la bela mort’ la morta senmortemo,
Beno joga, fino de la naskiĝemo.

Ĉiuj tiaj mortoj taugas nur por kelkaj.
Multaj homoj venos nur al mortoj velkaj.
Ni malsame travivadas, ja malsame
Ni elmortos, ĉiu laŭ la propra vojo
Ĝis finfino, kiam pro renaskigado
Ĉesos tera ludo per ekkomprenado.

1958

Cirkus

De Roland THIBAUT

Hieraŭ ni alvenis en novan urbon. Niaj povraj ĉevaloj ne sciis kiel agi. Post nur kelkaj minutoj ni devis forlasi la belan ebenan straton por ligi la ĉevalojn en iu parko. Subite alvenis geknaboj kriante "cirkus, cirkus". Ni rigardis nin kaj miris, ke ni komprenis la vorton. Sed kie estas tiu cirko? Ni vidis koloseon nenian. La geknaboj fingromontris niajn ĉevalojn kaj ĉarojn. Ili tuŝis niajn vestojn. La togoj interesis ilin. Tiumomente, niaj du militistoj alproksimiĝis al la ĉaroj kaj eltiris siajn glavojn el la glavangoj. La geknaboj retroiris. Nia ĉefo komprenis bone, ke la geknaboj ne estis danĝeraj. Li ordonis al la militistoj reglavingigi iliajn glavojn.

Unu el la geknaboj eltiris etan aĵon el truo en sia vesto. Li puŝis la ŝajnigitajn al mi ŝtonetojn, poste li metis ĝin apud la orelo. Li parolis al ĝi!! Eble tiu aĵo estas dio por ili? Post lia parolado, li ridetis kaj remetis la strangajon en ĝian truon.

Preskaŭ subite alvenis senĉevalaj ĉaroj kun etaj sunbrilaj lampoj. La ĉaroj kriis laŭte. La homoj ĉirkaŭ ni retroiris respekteme. Viroj eliĝis el la ĉaroj, ĉiu el ili tenis ilon en la mano dekstra. Ni ne sciis kion fari. Ili diris ion sed kompreneble ni ne scipovis la barbaran lingvon. Iu el la grupo ekkriis: *terrorist, terrorist*. Ĉiuj ekkriis la saman vorton. La viroj vestitaj de bluaj vestoj tenante la nigran ilon en la mano celis nin.

Kio okazis??

Kvazaŭ mi dormis kelkatempe. La geknaboj, la senĉevalaj ĉaroj, la bluestitaj viroj, ĉiuj malaperis. Ĉirkaŭiras min normalaj togovestitaj viroj, normalaj ĉaroj, kaj normalaj militistoj. La homamaso krias: "cirkus, cirkus". Ĉiuj piediras ĝis la koloseo. Ankaŭ mi.

Homaranisto

De Keneĉjo Goldbergo

Mi pensas pri la mondo. En mia imago
Ĉiuj estas sataj.
Neniuj soifas.
Duono ridetas. Duono ploras.
Ĉiu estas komprenata.

Por Henry

De Keneĉjo Goldbergo

Mi pensas pri vi, frato,
Kiu komprenis min.

Mi pensas pri vi, frato,
Tra la tutaj jaroj.

Mi pensas pri ni ridantaj,
Ludantaj frenezajn okojn,
Marŝajntaj ĝis la sepdek dua strato
Por manĝi blincojn nokte.

Ŝtelinte boaton en la Centra Parko,
Ni parolis.

Mi pensas pri vi, frato,
Kiu komprenas min.

Nenio aldone

De Pablo Neruda

Elhispanigis Keneĉjo Goldbergo

Pri l' vero mi solidaris:
lumon sur la teron remeti.

Mi deziris esti kiel la pan':
La lukt' ne min mankantantan trovis.

Sed tie ĉi mi estas, kun tio, kion mi amis,
kun la soleco, kiun mi perdis:
apud ĉi tiu ŝton' mi ne ripozas.

Laboras la mar' en mia silent'.

Excelsior

De Walt Whitman

Tradukis Maurice Wittenberg

Kiu iris plej malproksimen? ĉar mi volus iri pli malproksimen,
Kaj kiu estis justa? ĉar mi volus esti la plej justa persono de la tero,
Kaj kiu plej zorgema? ĉar mi volus esti pli zorgema,
Kaj kiu estis plej feliĉa? ho mi pensas, ke estas mi — mi pensas, ke neniu estis iam pli
feliĉa, ol mi,
Kaj kiu donis ĉion? ĉar mi donas konstante la plej bonan, kion mi havas,
Kaj kiu estas plej fiera? ĉar mi pensas, ke mi pravus esti la plej fiera filo vivanta — ĉar mi
estas la filo de la fortika kaj altsupra urbo,
Kaj kiu estis aŭdaca kaj lojala? ĉar mi volus esti la plej aŭdaca kaj lojala estaĵo de la
universo,
Kaj kiu bonfarema? ĉar mi volus montri pli da bonfaremo, ol ĉiuj ceteraj,
Kaj kiu ricevis la amon de la plejmulto da amikoj? ĉar mi scias, kio estas ricevi la
pasian amon de multe da amikoj,
Kaj kiu posedas perfektan kaj amatan korpon? ĉar mi ne pensas, ke iu posedas pli
perfektan aŭ amatan korpon, ol la mia,
Kaj kiu pensas la plej ampleksajn pensojn? ĉar mi volus ĉirkaŭi tiujn pensojn,
Kaj kiu faris himnojn, taŭgajn por la tero? ĉar mi frenezas per konsumanta ekstazo fari
ĝojajn himnojn por la tuta tero.

Ho Kapitan'! Mia Kapitan'!

de Walt Whitman

Elangligis Maurice Wittenberg

Ho Kapitan'! mia kapitan'! la terura vojaĝ' finiĝis,
La ŝipo ĉion kontraŭstaris, serĉatan premion atingis,
Haven' proksimiĝas, sonorad' aŭdiĝas, popolo nun ĝojanta,
Okuloj sekvas stabilan kilon de l' severa ŝip' venkanta,
Sed ho kor'! kor'! kor'!
Ho la sanga ruĝo forta,
Sur la ferdek' la Kapitan',
Falinta fride morta.

Ho Kapitan'! mia Kapitan'! leviĝu jen sonorad';
Leviĝu — por vi la standard' tie — por vi la trumpetad',
Por vi la bukedoj kaj girlandoj — por vi la svarmaj bordoj,
Por vi avidmiene vokas, la grandaj popolaj hordoj,
Jen Kapitano! kara patro!
La brako kapoporta!
Ĉu ia song', ke sur la ferdek',
Vi falis fride morta?

Mia Kapitano ne respondas, la lipojn li ne movas,
Mia patro ne sentas mian brakon, la pulson plu ne havas,
La ŝipo estas sekurankrita, la sukcesan vojaĝon fininte,
De l' terura vojaĝ' alvenis ĝi, venkinte, celgajninte;
ojegu ho bordoj, sonoru sonoril'!
Sed mi kun premo gorĝa,
Paŝas apud la Kapitan',
Falinta fride morta.

Silentoj: hajkociklo

de Donald Jacob UITVLUGT

shinnen

Novjara festo;
sub la plafono reĝas
plenhejma resto...

haru

Nun en la kuvo
kvietas rondoj ondaj —
printempa pluvo...

natsu

Varmo sur l' greso;
eĉ al akrida ĉirpad'
okazas ĉeso...

aki

Sangaj folioj —
kiel arbar' kvietas
post cervaj krioj...

fuyu

Preter festona
domo, neĝe blankiĝas
tombo senŝtona...

This issue of *Esperanto USA* is being sent to all those who are or were members of ELNA in 2003, 2004 and 2005. If you have not yet renewed your membership for 2005, please do so either by sending your dues to: ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, or by going on-line at <http://www.esperanto-usa.org/> and signing up there. We look forward to hearing from you.

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit# 1040